

Unu jarcento de esperanto-instruado: V  
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1987

Cl.- Nome de Svisa Radio Internacia parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND pri la temo unu jarcento de esperanto-instruado.

Hodiaŭ ni diru kelkajn vortojn pri tre produktivaj ekzercoj, kiuj estas karakterizaĵo de la esperanto-instruado praktikata ĉe Kultura Centro Esperantista en La Chaux-de-Fonds kaj iom post iom tutmonde en la medioj, kiujn Kultura Centro Esperantista didaktike influas. Tiuj strukturŝanĝaj ekzercoj estas paroligaj kaj montriĝas ege efika gimnastiko lingva. Kiuj lernis esperanton pere de ili, tiuj fariĝas lertaj interpretistoj kaj fajnaj stilistoj.

A.- Jen klarige ekzemplo de strukturŝanĝa ekzerco.

Cl.- Ekde la unua enkonduka leciono de esperanto-staĝo la esperanto-lernantoj povas jam amuziĝi fari tiujn ŝanĝojn:

A.- Al lernantoj, kiuj sekvis tradician kurson, se oni diras, donu kvardekon da malsimilaj frazoj, kiuj esprimas la personon: **Lundon ni komencis la esperanto-kurson**, oni donas la impreson peti ion nefareblan. La plimulto el la demanditoj ne konscias, kian esprim-riĉecon kaŝas esperanto dankal sia gramatika reguleco.

Cl.- Analizo de la proponita pensunuo serĉigas unue la mastron kaj la kernvorton, kiujn la tradicia greklatina-terminologio nomas **subjekto** kaj **verbo**. En la pensunuo

A.- **Lundon ni komencis la esperanto-kurson.**

Cl.- la mastro estas:

A.- **ni**

Cl.- kaj la kernvorto estas:

A.- **komencis.**

Cl.- La restantaj vortoj estas la gastoj:

A.- **lundon**

Cl.- kaj

A.- **la esperanto-kurson.**

Cl.- Estas amuze kaj instrue ŝanĝi la markojn, kiuj karakterizas tiujn gastojn: ioma esploro kondukas tre rapide la lernantojn al vico da ŝanĝproponoj: Anstataŭ **la lundon**, oni povas diri:

A.- **je lundo, la lundan tagon, je la lunda tago, lunde, kiam estis lundo, kiam lundis.**

Cl.- Ni povas do elekti inter 7 diraĵoj. Anstataŭ **la esperanto-kurson**, oni povus diri:

A.- **la kurson de esperanto, la esperantan kurson, la kurson esperantan.**

Cl.- Ni povas elekti inter 4 diraĵoj. Plua esploro montras, ke **ni komencis** ankaŭ povus diriĝi alimaniere:

A.- **komenciĝis.**

Cl.- La gasto **la esperanto-kurson** tiam fariĝas la mastro **la esperanto-kurso.**

A.- **lundon ni komencis la esperanto-kurson** aŭ **La lundon komenciĝis la esperanto-kurso.**

Cl.- Sume ni havas do 7-foje 2-foje 4 ekvivalentajn pensunuojn, tio estas 56 pli malpli ekvivalentaj pensunuoj. Ni listigu parton el ili.

A.- La lundon ni komencis la esperanto-kurson.  
Je la lundo ni komencis la esperanto-kurson.  
La lundan tagon ni komencis la esperanto-kurson.  
Je la lunda tago ni komencis la esperanto-kurson.  
Lunde ni komencis la esperanto-kurson.  
Kiam estis lundo, ni komencis la esperanto-kurson.  
Kiam lundis, ni komencis la esperanto-kurson.

Cl.- La lundon komenciĝis la esperanto-kurso.  
Je la lundo komenciĝis la esperanto-kurso.  
La lundan tagon komenciĝis la esperanto-kurso.  
Je la lunda tago komenciĝis la esperanto-kurso.  
Lunde komenciĝis la esperanto-kurso.  
Kiam estis lundo, komenciĝis la esperanto-kurso.  
Kiam lundis, komenciĝis la esperanto-kurso.

A.- La lundon ni komencis la kurson de esperanto.  
Je la lundo ni komencis la kurson de esperanto. ktp...

Cl.- La lundon komenciĝis la kurso de esperanto.  
Je la lundo komenciĝis la kurso de esperanto.  
ktp. ktp.

Abundas tiuj strukturŝanĝaj ekzercoj, kiuj avantaĝe anstataŭas la tradukekzercojn. Kiam ni havas gelernantojn el pluraj nacilingvoj, montriĝas tre interese kaj instrue informiĝi, kiu esprimmaniero plej kongruas kun ĉiu lingvo aparte. Tiuj komparoj malkovrigas la veran internaciecon de esperanto, kiu ne estas je la nivelo de la elekto de la vortelementoj, sed de la kapablo speguli diverstipajn pensstrukturojn.

A.- Tiuj ekzercoj fakte havas stilan efikon. La lernantoj akiras la kapablon pli flekseble esprimi sian penson, ol per la tradicia ĝisnuna instruado. Ankaŭ ili emancipiĝas de la nacilingva modelo. Staĝ-raporto, kiu listigas la tagojn, laŭ la ĉi-sekva ekzemplo, pravas la

efikon de tiu instruado: "Lunde komenciĝis la esperanto-kurso; la mardan matenon ni konatiĝis kun la verkaro de Julio Baghy; la merkredon ni skipromenis; kiam ĵaŭdis, fonduon ni frandis; kaj jam estis la vendreda tagmanĝo, la adiaŭa manĝo."

(Ĉu mankas tekst-ero tie ĉi?)

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND diras al vi: ĝis reaŭdo!

---

*Kopirajto © Claude GACOND, [www.esperanto-gacond.ch](http://www.esperanto-gacond.ch)  
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), decembro 2012*